

Numero: 335.
Aprilo 2020.

28-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Aprilo

Tradukmaŝino denove

Mi rigardas tra la fenestro kaj min allogas la naturo. Ĉio verdas kaj floras. La kamparoj, arbaroj vestis siajn plej belegajn vestojn.

Mi sentas allogon por ke mi forĵetu la plumon kaj vagadu en la bonodora arbaro, kie miloj da birdoj trilas kaj ili faras admirindan koncerton por la ekskursanto.

Ho, printempo! Vi estas mem la renaskiĝo kaj renoviĝo. Vi montras al ni, ke la vivo estas eterna. Post morto venos nova vivo kaj ni homoj estas kapablaj venki la malhelon.

Ankaŭ en la plej granda ĉagreno estas espero. Ni neniam rezignu, akceptu la malbonon. Ni plenkore kedu, alvenos la tago, kiam varmaj sunradioj orumos la tutan terglobon.

Mi scias, estas malfacile kredi, ke la malhelaj tagoj forflugos kaj ĉio baldaŭe montros ridetan vizaĝon.

Tio ĉi estas en la kazo de nia amata lingvo. Nun oni ankoraŭ priridas nin kaj oni mansignas, kial lerni Esperanton? Sed ni scias la semoj eliĝos el la tero en iu tago kaj el la semoj fariĝos belegaj floroj.

Oni devas kredi, ke la nigraj nuboj malaperos de sur la firmamento kaj la homaro ekvidos la eksterordinaran trezon en la zamenhofa lingvo.

Mi mensogus, se jam kelkfoje mi ne estus malaperiĝinta pro la fiaskoj kaj kiam mi vidis, ke multaj homoj indiferece iras preter Esperanto.

Sed en la sekvaj minutoj el la profunda puto de l' espero mi verŝas forton kaj pozitive mi rigardas antaŭen kredante, alvenos la fina venko.

Ni homoj ne povas esti tiom stultaj, ke ni forĵetas tiun ĉi grandiozan trezoron, kion doktoro Zamenhof kreis por ni.

— Redaktanto —



Antaŭ nelonge mi jam skribis pri tradukmaŝino.

Hodiaŭ mi vidis reklamfilmeton de nun farita tradukmaŝino.

Onidire per tiu ĉi „maŝino” oni povas traduki almenaŭ el tridek du lingvoj. La uzanto enparolas „la maŝinon” kaj en la sekva momento la alia homo jam aŭdas la tradukitan tekston. Ankaŭ li aŭ ŝi enparolas „la maŝinon” kaj tiel ili senĝene povas babiladi.

En la estonto ne estos necese lerni fremdajn lingvojn. Tiu ĉi „maŝino” solvos por ni ĉiujn problemojn, eĉ ni ne bezonos interpretiston. En nia poŝo ni povos kunporti tiun ĉi bonegan ilon.

En la reklamfileto mi vidis, kiel ni babilados en la estonto. Ĉion regos la maŝinoj. Absolute ni homoj estos bezonataj aŭ ni fariĝos interesaj, ekspoziciitaj objektoj en iu muzeo, kie la komputilo-homoj strange gapos nin.

La komputilo-homo patro klarigos al sia komputilo-homo fileto aŭ filineto:

— Rigardu, antaŭ tiuj ĉi estaĵoj vivis sur la terglobo. Ili ankoraŭ lernis fremdajn lingvojn, se ili deziris babiladi unu kun la alia. Vi jam naskiĝis (aŭ vi estis muntitaj) en bona epoko, kiam vi ricevis la lingvoscion helpe de enkonstruita tradukmaŝino. Sed ni rapide, ĉar mi vidas niaj baterioj elĉerpiĝos kaj en tiu ĉi muzeo ni ne povas alŝuti ilin!

Mi ne songas pri tia estonto. Vere per tradukmaŝino la komunikado estos pli komforta kaj pli rapida, tamen el tiu ĉi vivo mankus io, la plezuro de la akiro de la lernita lingvoscio.

Espereble ankaŭ post jarcentoj estos homoj, kiuj elektos la malfacilan lingvolernadon kaj ili ne babilados helpe de tradukmaŝino.

Ne forgesu, scii iun fremdan lingvon estas grandioza sento kaj ĝi pliproksimigas la homojn unu al la alia.

— Ŝaŝa —



Vojaĝo al la lando de la misteroj

— tria ĉapitro —


Elinjo estis belega junulino. Kial ĝis nun mi ne rimarkis ŝian belecon?

Dum jaroj ni kune estis la oficejo. De mateno ĝis malfrua vespero ni laboris, kiel maŝinoj. Ni apenaŭ rigardis unu al la alia kaj nun sur tiu ĉi insulo okazis io. Ni devis travojaĝi la tutan oceanon por ke mi ekvidu la belecon de tiu ĉi knabino.

Kiom interesa estas la vivo. Ni apenaŭ konas unu la alian.

Efektive, kion mi scias pri Elinjo? – Nenion. Mi scias ŝian nomon. Mi scias, ke ŝi estas sekretariino.

De la estraro de la firmao, ni ricevis tiun ĉi ŝipovojaĝon. Kaj nun ni estas sur tiu ĉi stranga insulo. Eĉ tion ni ne scias, al kiu lando apartenas la insulo. Eble tia lando eĉ ne ekzistas. Ĉio estas nur sonĝo.



Mi interesigante rigardas la bluan birdon. Ĝi nur sidas senmove sur la branĉo de la arbo kaj ĝi rigardas nin.

Kion pensas nun Elinjo? Ĉu ankaŭ ŝi opinias kiel mi? Mi devus demandi ŝin. Sed mi timas.

Ĝis nun mi estis nun bonaj gekolegoj, kiuj helpis unu la alian.

Eble Elinjo havas koramikon. Ankaŭ antaŭ la vojaĝo ŝi tre rapidis ien post la laboro.

Mi intencis demandi ŝin: „Elinjo, kien vi rapidas? Ĉu vi iras al randevuo?” Mi estis malkuraĝa. Verdire tiutempe min Elinjo ne tro interesis. Mi ne scias kial. Ja, kiel mi jam menciis, almenaŭ deŝi tri jaroj ni laboras en la sama kontoro.

Kiam mi estis dungita ĉe la firmo, kiel ĝenerala inĝeniero, la tiea oldulino Franciska diris, ke evitu Elinjon, ĉar ŝi estas la amantino de la sinjoro direktoro.

Pasis duonjaro kaj la direktoro estis maldungita, eĉ la polico arestis lin pro malversacio.

La direktoro malaperis, Elinjo restis.

Kio okazis al mi? En mia korpo mi sentis tremadon. Ĉu tion ĉi vidas ankaŭ ŝi? Mi timis rigardi al mia kolemino.

Ni devus iri plu, sed ni nur staras antaŭ la blua birdo.

En la foro eksonis la voĉo de la ŝipofajfilego.

Eble ĝi signas la ekiron. Sed kie estas la aliaj? Nenie mi vidis niajn kunvojaĝantojn, kvankam kiam ili elŝipiĝis la motorboato turnis kun ili trifoje.

Mi volis diri al Elinjo: „Ni devus reiri, certe jam la motorboato atendas nin.”

Mi ne scias kial, sed mi ne povis malfermi mian buŝon. Mi nur staris antaŭ la blua birdo. Kvazaŭ ni estus ŝtoniĝantaj.



La ŝipofajfilego denove eksonis. Je tio jam ankaŭ Elinjo ekmovis kaj ŝi rigardis al mi. Sed ŝi ne povis ekparoli.

Neatendite ni ambaŭ ekiris unu al la alia. Mi prenis la brakon de Elinjo kaj mi komencis tiri ŝin al mi.

Mi sentis, ke niaj buŝoj kunfandiĝas. Ŝia kiso estis arda kaj dolĉa. Ĝi flugigis min en la ĉielon.

Ni diris nenion. Anstataŭ ni parolis la sentoj, la tremado de nia korpo. Mi aŭdis la tiktaktadon de ŝia koro.

Samtempe mi ĵetis rigardon al la blua birdo, kiu restis sidanta sur la branĉo de la arbo. Post kelkaj sekundoj kvazaŭ ĝi pependus ion. Sed ni ne komprenis ĝin.

Mi brakumis forte la talion de Elinjo, ankaŭ ŝi la mian. Ni estis kvazaŭ du radikoj eliĝante el la profundo de tero.

— daŭrigota —



Poezio



ANNABEL LEE
de Edgar Allan Poe.

(Ĉi tiu traduko gajnis la unuan premion en klaso 3 de nia "Nova Literatura Konkurso.")

Antaŭ multe da jaroj, en reĝoland'
Ĉe la maro, sciu vi,
Ke loĝadis tre bela virgulin' —
La aminda Annabel Lee —
Kies sola pensad' estis ami min
Kaj esti amata de mi.

Mi nur infan' kaj ŝi nur infan'
En reĝlando tiu ĉi,
Amadis kun am' pli profunda ol am'
Mi kaj Annabel Lee;
Kun am' tiel granda, ke eĉ la serafoj
Enviemiĝis al ni.

Kaj jen do la kaŭz' — antaŭ tre longa temp'
En reĝlando tiu ĉi —
Ke vento elblovis el nub' kaj morton
Alportis al Annabel Lee.
Venis do ŝia altranga parenc'
Kaj portis ŝin for de mi,
Por entombigi izola ŝin
En reĝlando tiu ĉi.

L' anĝeloj, ne tiel feliĉaj ĉiele,
Sentadis envion al ni —
Jes! tial okazis (kiel scias homar',
En reĝlando tiu ĉi),
Ke la vento elvenis el nokta nub',
Morton portante al Annabel Lee.

Sed ni amis kun am' pli potenca ol am'
De homoj pli aĝaj ol ni —
De multaj pli saĝaj ol ni —
Kaj nek la anĝeloj en alta ĉiel',
Nek demonoj malsupre de ni,
Povos iam disigi de mia anim'
La animon de Annabel Lee:

Ĉar ne brilas la lun' ne portante al mi

Belajn sonĝojn pri Annabel Lee;
Kaj kiam ajn stel' levas sin en ĉiel'
Mi ekpensas pri Annabel Lee;
Do, tra tuta la nokt' apud ŝi — karulin' —
Kiu estas viv' mia kaj kara edzin',
Kuŝas mi en tombeg' tiu ĉi
Ĉe la mar' kie dormas ŝi.

El angla lingvo tradukis
RHODES MARRIOTT.

VII. AL LA VESPERA STELO.

(El „Tannhäuser” de Richard Wagner).

Funebre kovras la krepusko valon,
Etendis nokto nigran la vualon.
Deziras suprenflugi la anim',
Sed tenas ĝin de nokt-teruroj tim'.

Aperas jen, vi stelo la plej kara:
De malproksimo fluas lumo klara,
Disigas ombrojn ĉarma la radi',
Amike montras la vojon al mi.

Ravite, ho vespera stel',
Mi vin salutas sur ĉiel';

Kaj de fidela mia kor'
Salutu ŝin en tiu hor',
Kiam ŝi flugos for de l' tero,
Al anĝelar' en supra sfero!

— Tradukis: Antoni Grabowski —



Por infanoj

Daŭriga rakonto el la rakonto``

MIRINDA RENKONTO``

la dua parto de la marta numero

Je la oka vespere kolektiĝis niaj amikoj en la granda ĉambro por pridiskuti kion ili estis preparitaj por la ĉi vespera aranĝo. Sara vestis belan rozkoloran robon, same ŝi metis tian onamitan harofiksilon, sur la pinto de la kapo. Ŝiaj okuloj brilis rigardante al direkto de Pavlo. Ĉiu alia estis aparte modeste vestita sed kun bona gusto. Sara diris fiero`` Jen, ni ĉiuj mem preparis mane la bildkartojn kiel gratulkartoj por la Nova Jaro. Dume Petro kaj Jana estas ekkantontaj belan kanton dediĉita al Novajaro okazonta je la deka vespere kune kun la infana ĥoruso.``

Ĉiuj aplaŭdis gaje. Ili preparis siajn donacetojn enpakigitajn kaj ligitajn per multkoloraj maŝoj.

Tiam eksonoris sur la domopordo.. Venis taksio por la junuloj. Petro amuziĝis kun la gaja amikaro irante piede tra la urbo. Subite la grupeton haltigis du pli aĝaj homoj petante ili ke ili lasu tri ursetojn kun ili en la apuda domo por amuzi ilin dancante laŭmuzike, ĉar ili festas naskiĝtagon de sia filo..

Petro nevole akceptis tiun proponon sed decide li diris``Mi lasos ilin se vi promesos ke vi ĉiuj alvenos je la deka al la urboplaco kie ni havos aranĝon.``

La novuloj akceptis ĉion proponitan flanke de Petro. Dirite farite.

Tiel tri ursetoj :la Grandokulo, bluaĉapulo ``Klaŭno`` kaj la sportemulo kiel mezalta urseto, forlasis sian gajan grupeton.

Kio okazis je la deka vespere ni vidos. Ĉu oni devas kredi al novuloj?

Atendu pacience ĝis la nova rakonto!

Estas daŭrigota!

Verkis Miriĉ Jadranka Zajeĉara Esperanto klubo
Serbio Decembre 2019



Poemo dediĉita al 160 jariĝo de esperanto uzado

Lazaro Ludoviko
via E-o gramatiko
al ĉiu konvenas,
al ĉiu bonvenas!

Laŭdata akuzativo
servas kiel forta lokomotivo
por ke nia trajno ne stumblu,
stirante nin de unu al la alia,
iranta ĉiam antaŭen, nun eĉ plu.
Dimutivon ni facillernigas.

Ĉar dometo aŭ domego
dependas nur de via ego!

Esperantistoj estas gaja, helpema amikar`
troviĝanta en montar`aŭ apud mar`.

Ili ĉiam donos bonetoson
per kant` bela aŭ ŝerco navigvela.

Ja, gravas ke oni ĉiam pravas
dirante:`Lernu, verku, kaj parolu
ĉiutage laŭte aŭ lante
gravas nur, esperante!

Esperanto oferta esperon, amikadon
Senpagan reton aŭ klasikan
laŭnivele virtualan
Esperanto edukadon!

Verkis: Miriĉ Jadranka Zajeĉara Esperanto klubo
2019 Serbio



Sonô

Sonô

